# Izrael Lejzerowicz: radikala esperantisto

de Ulrich Lins





Izrael Lejzerowicz en 1930. Fonto: Bildarkivo Aŭstria

Izrael Lejzerowicz naskiĝis, evidente kiel judo, la 4-an de junio 1901 en Lodzo, en parto de Pollando, kiu estis tiutempe regata de Rusio. En tiu urbo vivis, simile al pluraj aliaj polaj urboj, granda nombro da judoj. Ĝi havis en septembro 1939, tuj antaŭ la eksplodo de la Dua Mondmilito, entute 700.000 loĝantojn, el kiuj 233.000, do ĉirkaŭ triono, estis judoj. Sed ĝi estis diferenca de ekzemple Bjalistoko, la fama devenloko de Zamenhof. Lodzo, situanta multe pli okcidente, estis prospera industria urbo, la centro de la pola teksindustrio. Lejzerowicz versis pri ĝi jene:

> Nigra urbo fumkovrita vomas ŝviton de gefiloj,
> Al ĉielo portas ĝemojn de malsato kaj malfort' –
> [...][1]

Lodzo karakteriziĝis en la 19-a kaj frua 20-a jarcento per ne senkonflikta, sed ĝenerale fruktodona kunvivado de poloj, germanoj kaj judoj. Ĝi demonstris, ke en tiu orienteŭropa regiono ja povis estiĝi specifa multetna socio.[2]

Ni ne scias ekzakte, kiam Lejzerowicz lernis Esperanton. Li mem tion ne bone memoris en junio 1934, kiam li skribis, ke kiel 11- aŭ 12-jara knabo li iĝis esperantisto – do verŝajne en 1912 aŭ 1913. En

1 Represita en: Zofia Banet-Fornalowa, *La pereintoj in memoriam*, Czeladź: Hejme, 2003, p. 216. Vd. samlibre la kontribuon de la aŭtorino pri Lejzerowicz, “Fidela apostolo li estis…”, pp. 194-212. – Valoras aldoni, ke ankaŭ la granda pola lirikisto Julian Tuwim (1894-1953) naskiĝis en Lodzo kaj poezie verkis pri sia hejmurbo. Antaŭ la Unua Mondmilito li lernis Esperanton kaj tradukis el ĝi poemojn. Lejzerowicz siavice esperantigis poemojn de Tuwim, vd. ekzemple *Literatura Mondo* III, 1. 1931, n-ro 7, pp. 134, 145.

2 Jürgen Hensel, ed., *Polen, Deutsche und Juden in Lodz 1820-1939*, Osnabrück: Fibre, 1999.

1913 registriĝis esperantista grupo en Lodzo, kaj eble Lejzerowicz jam apartenis al ĝiaj membroj. Post la milito, je kies fino restariĝis sendependa Pollando, li estis plenaĝa kaj pli kaj pli aktivadis por Esperanto. Fine de 1921 li iĝis prezidanto de nove fondita junulara sekcio de Lodza Esperanto-Societo kaj komencis redakti kaj eldoni *Junula Voĉo,* manskribitan, hektografitan bulteneton.

En 1929 estis fondita nova Lodza Esperanto-Societo, kiu tuj havis gravan taskon, ĉar ĝi invitis por 1930 la Kvaran Kongreson de Polaj Esperantistoj. Lejzerowicz estis ĝenerala sekretario de la kongresa organiza komitato. Kredeble ŝuldiĝis grandparte al li, ke la kongreso, kiun partoprenis ankaŭ Felikso kaj Lidja Zamenhof, havis bonan publikan eĥon.

En adreslibro de polaj esperantistoj aperinta en 1931 Lejzerowicz estas indikita kiel komercisto. Sed *Enciklopedio de Esperanto* (1933/34) nomas lin "ĵurnalisto, komercisto" kaj cetere notas pri li: "Gvidanto de la E-movado en Lodz kaj unu el la plej agemaj E-istoj en Pollando."

Tamen, Lejzerowicz ne estis nur loka kaj landa aktivulo. Lin allogis – kiel multajn aliajn en lia generacio – la internacieco de Esperanto aŭ, pli konkrete, la homarana ideo, la celo de egalrajteco trans la limoj de nacio, religio kaj lingvo. Estante judo, li kaptiĝis de tiu ideo pro motivoj, kiuj similis al tiuj de Zamenhof mem kaj kiujn dividis proporcie tre alta nombro de la frutempaj pioniroj de la Esperanto-movado precipe en orienta Eŭropo. Li mem skribis, ke por li kiel knabo apartenanta al diskriminaciata gento "tia movado, por kiu ne ekzistas diferencoj rasaj nek naciaj, [...] nepre devis imponi kaj ŝajni revelacio". Li daŭrigis: "Estas kompreneble, ke tia knabo kun sia tuta junula fantazio kaj amo fordonis sin al la Afero, ke li kun blinda obstino ekbatalas por ĝi, plena de firma kredo kaj fido, ke batalante por esperanto, li batalas ne nur por idiomo, pli bona ol Volapük aŭ Ido, sed ankaŭ kaj super ĉio por ideo, pli ĝuste: por idealo, kiun tiu lingvo portas en si... por la Zamenhofa idealo." Lejzerowicz, denove simile kiel Zamenhof kaj multaj judaj esperantistoj, konsciis, ke estas konsilinde ne tro multe akcenti la specife judajn esperojn ligitajn kun Esperanto ("ĉar 'tio povas malutili' al nia afero"), sed – retrorigardante en la jaro 1934 – iom kontente konfesis, ke "interne de la movado juda esperantisto sentis sin preskaŭ egalrajta".[3]

Tamen, diference de Zamenhof, kiu post la publikigo de la Unua Libro ne volis publike ligiĝi kun cionismaj aŭ similaj jud-emancipaj celadoj, Lejzerowicz almenaŭ portempe aktivis por aparta organizo de judaj esperantistoj. Post du malsukcesaj provoj, dum la 17-a Universala Kongreso (UK) en Ĝenevo (en 1925) estis fondita nova Hebrea Esperanto-

3 I. Lejzerowicz, "Mi estas Judo…", *Nia Gazeto* I. 1934, n-ro 5, p. 2; represita en Banet-Fornalowa, *La pereintoj*, pp. 217-220.

Asocio. La fama folkloristo Immanuel Olsvanger (1888-1961) iĝis honora prezidanto, sed la gvidan kaj administran laboron transprenis, kiel prezidanto, Lejzerowicz. Li publikigis en 1926 jidlingvan lernolibron de Esperanto kaj en 1927 jidan "ŝlosilon" de Esperanto. En 1927 aperis lia traduko de la fama jud-mistika dramo *Dibuk*, originale verkita hebree de Ŝ. An-ski. El la jida li tradukis en Esperanton la romanon de Ŝalom Asch, *La sorĉistino el Kastilio* (1933). Tamen, ŝajnas, ke tiu HEA ne estis pli sukcesa, ol ĝiaj antaŭuloj.[4]

Ĉiuokaze, Lejzerowicz estis tro esperantista por ekskluzive aŭ eĉ nur unuavice agadi por judaj aferoj. Li iom post iom iĝis certagrade konata ankaŭ en la internacia movado. Jam en 1923 li iĝis membro de la Lingva Komitato. Kaj per artikoloj li regule kontribuis al Esperantaj gazetoj, al *Pola Esperantisto, Heroldo de Esperanto* kaj *Literatura Mondo*. La temo de tiuj artikoloj estas ĉefe la ĝenerala Esperanto-movado, kies disvolviĝon Lejzerowicz akre observas. Li precipe atentas la idean flankon de la movado kaj, ekzemple en artikolo aperinta komence de 1928, turnas sin kontraŭ "senideiĝo" de Esperanto kaj kontraŭ "neŭtralismo", kiu "evitas ĉian liberan spiron, ĉian noblan altidean ekscitiĝon, sufokiĝante en maro da 'artikoloj' [...], kiuj plej ofte interesas sole turistojn", kaj li kontraste memorigas pri la Zamenhofa kompreno de neŭtraleco, kiu "ne timis ofendi la ŝovinistojn kaj nomi ilin laŭ ilia vera malpura nigra nomo" – la neŭtralismo de Zamenhof estis alta idealo, "kaj nun liaj disĉiploj malaltigis ĝin ĝis parodio".[5]

Lejzerowicz mencias la ambicion de kelkaj aktivuloj disponigi al la movado programon. Tion li malrekomendas, preferante ke la movado disvolviĝu "konforme al la spirito, kiu vivigis kaj edukis ĝin". Programo "paralizus" la agadon, "ni ne povas fidi je sekaj argumentoj". Li deklaras, ke "kie Esperanto estas traktata sole kiel lingvo, tie veraj Esperantistoj tute ne ekzistas", kaj nostalgie memorigas pri la pionira epoko, kiun regis "belega nedifinita sento" – kiam la "Esperantistaro mem estis la 'reunuigita homaro' en miniaturo".[6] Pri la Esperanta idealismo Lejzerowicz ofte komprenigis, ke ĝi "estis la prakaŭzo de la Esperanta lingvo".[7] Malgraŭ emo iom glori la pasintecon Lejzerowicz restas firme enradikiĝinta en la nuntempo. Li primokas tiujn, kiuj pro false komprenata "fundamentismo" batalas kontraŭ neologismoj, kaj montras bonan komprenon por la bezono de celkonscia organizita agado, vokante (en 1932) al mondskala kampanjo – en la formo de subskribo-kolektado – por la enkonduko de Esperanto en lernejojn.

4 Ulrich Lins, "Judoj kaj la Esperanto-movado", *La Gazeto* 21. 2006, n-ro 126, p. 12-14.

5 Izrael Lejzerowicz, "Iom pri neŭtraleco", *Heroldo de Esperanto* 9. 1928, n-ro 446, p. 1.

6 I. Lejzerowicz, "Programoj kaj ideoj", *Pola Esperantisto* 22. 1928, n-ro 2, pp. 4-5.

7 I. Lejzerowicz, "La verda sopiro", *Heroldo de Esperanto* 11. 1930, n-ro 584, p. 1.

Ĝis la komenco de la tridekaj jaroj Lejzerowicz atingis ioman renomon kiel bonstila polemikisto[8], sed liaj temoj – ĉefe primovadaj – ankoraŭ ne multe levis lin el la amaso de la pli aŭ malpli lertaj publicistoj de Esperantujo. Pli multe atentata, eĉ certagrade populara li iĝis per sia verketo *El la "Verda Biblio"* (1935)[9], kiu estas satiro elpikanta malfortajn punktojn de la movado, sed klare montranta, kiom ame la aŭtoro rilatis al ĝi. Bela ekzemplo por lia sinteno estas ankaŭ la artikolo "Kabeoj", kiu estas ĉarma omaĝo ne al "etanimaj kabeoj", sed al la dekmiloj da entuziasmaj laborantoj por Esperanto: "Venos foje la tago, kiam al la Nekonata Esperantisto estos starigata impona monumento."[10]

Ofte Lejzerowicz verkis optimisme. En 1932 li konstatas, ke estas tre multaj homoj, kiuj "principe" subtenas Esperanton, ke "malamikoj aŭ kontraŭuloj preskaŭ ne ekzistas".[11] Tion li skribis en *Pola Esperantisto.* Aliflanke, en *Heroldo de Esperanto* direktita al internacia publiko li jam en oktobro 1931 atentigas, ke apud la kontraŭuloj de la lingvo ekzistas aparta klaso de homoj, kies "sinteno koncernas ne nian lingvon, sed nian movadon, kiun ili terure malamas": "Ili vidas en ni agentojn de kaŝitaj potencoj internaciaj, minacantaj renversi la beatan ordon de la mondo." Tiuj kaŝitaj potencoj estas "framasonoj, judoj kaj bolŝevikoj". Lejzerowicz aludas precipe al agitado okaze de la 23-a UK en Krakovo.[12]

Komence de 1933 en Germanio la nazioj akiris la potencon. Lejzerowicz tiutempe finis la preparlaboron por publikigo de la romano *La sorĉistino de Kastilio*, kies temo estas la persekutado de judoj fare de la mezepoka inkvizicio. Sian antaŭparolon al la traduko Lejzerowicz komencas citante la eldiron de Heinrich Heine, "La judeco estas malfeliĉo". La libron mem Lejzerowicz nomas "protesto de sendependa penso kontraŭ fanatikeco, de kulturo kontraŭ spirita mallumo, de toleremo kontraŭ malamo" kaj "signalo je aspiroj pli noblaj kaj rilatoj pli homecaj". Lejzerowicz ne povis antaŭscii, ke, kiam aperos la libro, meze de Eŭropo estos establiĝinta reĝimo, kies agoj estis denove direktitaj kontraŭ judoj. Sed li estis inter la unuaj, kiuj rimarkis la epokan ŝanĝon, kaj li ne hezitis komenti ĝin. Li tion faris ne singarde aŭ atendeme, sed dekomence kun senrezerva malaprobo.

---

8 En la eseo "Originala aŭ tradukita literaturo?", *Literatura Mondo* II, I. 1931, n-ro 4, pp. 71 -72, Lejzerowicz esprimas sin skeptike pri la ŝanco krei kvalitan Esperantan literaturon kaj laŭdas la riĉigan kontribuon per bonegaj tradukoj el la tutmonda literaturo.

9 Izrael Lejzerowicz, *El la "Verda Biblio" kaj Babiladoj kun Horaĉo Serĉer*, Budapest: Literatura Mondo, 1935. – Estas reeldonoj en 1978, 2007 kaj 2014. La kvaran eldonon recenzis Fernando Pita, *Esperanto* 110. 2017, n-ro 4, pp. 82-83. Unuaj provoj de tiu satiro aperis ekde 1928 en *Heroldo de Esperanto* kaj *Literatura Mondo*.

10 I. Lejzerowicz, "Kabeoj", *Heroldo de Esperanto* 13. 1932, n-ro 703, p. 1.

11 I. Lejzerowicz, "Propaganda sugesto", *Pola Esperantisto* 26. 1932, n-ro 2, pp. 13-14 (cit. p. 14).

12 I. Lejzerowicz, "Nigraj semantoj", *Heroldo de Esperanto* 12. 1931, n-ro 640, p. 1.

La 11-an de majo 1933, do nur iom pli ol tri monatojn post la ekrego de Hitler, la nazioj aranĝis publikan bruligadon de libroj. Tio estis nur unu el multaj atestoj pri la netoleremo, persekutado kaj malindulgo, sed Lejzerowicz elstarigas la aŭtodafeon kiel tipan por la karaktero de la hitlera reĝimo, kiel kruele senvualigan. En *Literatura Mondo* li sub la titolo "Sangaj ludoj"[13] parolas pri "fajro vandala", historie tute senprecedenca. Por Lejzerowicz la bruligado de libroj de Heine, Lessing, Thomas Mann kaj Einstein superas la mezepokan inkvizicion, ĉar tiu bruligis individuajn homojn, dum ĉi-foje temas pri nenio alia ol bruligo de la homaro reprezentata per siaj geniuloj. En la koleron kaj furiozon de Lejzerowicz miksiĝas amaraj sentoj pro tio, ke la esperantistoj kiel kultura movado plejparte silentas pri tiu "barbara atenco al la libro", kaŝante sin malantaŭ la neŭtraleco. Tion Lejzerowicz rifuzas akcepti. Li emfazas, ke li parolas ne kiel judo, sed kiel "esperantisto, fiera disĉiplo de Majstro Zamenhof [...], pretendanto al homeco".

Por Lejzerowicz estis nature, ke esperantistoj devas protesti kontraŭ la bruligado de libroj. Tial li kontraŭis, ke daŭru la preparlaboroj por Universala Kongreso en Kolonjo, la 25-a UK. Tiuj komenciĝis en 1932 kun la apogo de la tiutempa ĉefurbestro Konrad Adenauer. Lin la nazioj eksigis el la ofico. La germanaj esperantistoj sciis, ke la nazioj malamegas ilian movadon, kaj tial dum iom da tempo timis, ke la UK ne povos okazi. Sed la reĝimo, ankoraŭ iom zorgema pri sia internacia reputacio, preferis ne malpermesi ĝin. La preparoj do pluiris, kvankam precipe ekster Germanio leviĝis voĉoj pledantaj por transigo de la UK al alia lando.

Tiuj pledoj kutime sin bazis sur la raportoj pri naziaj kruelaĵoj kontraŭ komunistoj kaj judoj kaj konklude avertis, ke la kongresanoj ne estos sekuraj en Germanio. Kontraŭajn argumentojn – pledantajn por la okazigo de la Kolonja Kongreso – plej energie uzadis *Heroldo de Esperanto*, kiu tiam aperis ĝuste en Kolonjo. Ĝia ĉefredaktoro Teo Jung (1892-1986) ne rekte neis, ke en Germanio okazas maltrankviligaj eventoj, sed bagateligis ilin por apelacii al la esperantistoj, ke ili grandnombre aliĝu al la UK.

Kontraŭ la pozicio de *Heroldo* Lejzerowicz tre forte protestis. Li deklaras, ke vera esperantisto ne povas partopreni kongreson "en lando, kies agoj bedaŭrinde neas ĉiun kulturon kaj plej primitivajn homecajn rajtojn". Lejzerowicz skribis tion en ĉefartikolo en *Pola Esperantisto* sub la titolo "Interna ideo kaj neŭtraleco".[14] Li koncedis, ke la oficiala movado ne povas miksi sin en aferojn de politiko kaj ankaŭ ne povas kondamni la faŝismon aŭ la komunismon. En tiu senco li defendis la

13 I. Lejzerowicz, "Sangaj ludoj", *Literatura Mondo* II, 3. 1933, n-ro 5, p. 76-77.

14 I. Lejzerowicz, "Interna ideo kaj neŭtraleco", *Pola Esperantisto* 27. 1933, n-ro 7, p. 97-99.

tradician neŭtralecon. Sed samtempe li atentigis pri la interligiteco de neŭtraleco kaj interna ideo. Memorigante pri la modelo de Zamenhof, kiu publike, en kongresoj, kondamnis la kontraŭjudajn pogromojn en Ruslando kaj ĉian ŝovinismon, li rifuzis sekvi neŭtralecon vid-al-vide de aktualaj kontraŭhomaraj, barbaraj agoj. Ĉar la movado finfine "ne estas butiko, kiu vendas sole Esperanton", sed estas ligita kun homeco kaj kulturo, ĝi ne povas resti neŭtrala "rilate al banditismo". Lejzerowicz kontraŭmetis al la kutime observata, laŭ li negativa neŭtraleco la principon de "pozitiva neŭtraleco", bazita sur la interna ideo.

Klaraj vortoj. Pli da pezo donis al ili la Kongreso de Polaj Esperantistoj, kiu komence de junio 1933 en Varsovio akceptis, certe sub influo de Lejzerowicz, rezolucion, ke la UK en Kolonjo "ne povos esti de la Poloj vizitata".[15]

La Kolonja Kongreso okazis, kun malpli da partoprenantoj ol atendite, ankaŭ kun hokokrucaj flagoj kaj parolado de la nova, nazia ĉefurbestro. Post ĝi Lejzerowicz ankoraŭ pliakrigis la tonon. Li parolis pri "dolora ofendo al la idea esperantismo" kaj kulpigis la Internacian Centran Komitaton, la plej altan instancon de la movado, ke ĝi perfidis "la altajn idealojn Zamenhofajn por eviti la koleron de la Tria Regno". Lejzerowicz substrekis, ke inter kulturo kaj barbareco ne eblas kompromiso. Ni iom pli longe citu el tiu artikolo, ĉar ĝi aparte ilustras la penson kaj lingvaĵon de Lejzerowicz:

"Se tamen I.C.K. [...] iris en la Trian Regnon por 'jubilei', kiam la plej bravaj amikoj de la verda standardo putras kaj suferas en la karceroj kaj koncentraciaj tendaroj; se ĝi venis en la Trian Regnon por kanti la Zamenhofan himnon, kiam difuzas ankoraŭ en la aero kaj gratas la gorĝon la haladzo el la libro-aŭtodafeo; se ĝi propravole iris en la trian regnon, kiu cinike kaj vandale neniigas ĉion, kio inter aliaj ankaŭ karakterizas la esperantismon – tiam ni postulas klarecon. Tiam ni postulas revizii la esencan karakteron kaj ideologion de la esperantismo! Tiam ni faru krucon super la glora kulturidea tradicio esperantista kaj ni deklaru ke Esperanto estas nur kaj sole lingvo kaj nin tute ne interesas, kiu uzas ĝin: Zamenhof aŭ Goebbels; ke esperantisto rajtas bruligi librojn de Toller, Zweig, Mann, Spinoza, Wassermann, Einstein – kaj malgraŭ ĉio kalkuli je solidareco de la tutmonda 'samideanaro'; ke esperantisto rajtas lanĉi zoologian antisemitismon kaj aranĝi mezepokan inkvizicion – kaj tamen aparteni al la 'granda rondo familia'..."[16]

15 Edvardo Wiesenfeld, "La VI Tutpola en Varsovio", *Pola Esperantisto* 27. 1933, n-ro 6, pp. 81-87 (cit. p. 86).

16 I. Lejzerowicz, "Sobre kaj decide", *Pola Esperantisto* 27. 1933, n-ro 8/9, pp. 114-116 (cit. p. 116).

Kelkajn monatojn poste Lejzerowicz revenis al la leciono, kiun donis la Kolonja Kongreso al la Esperanto-movado. Li atentigis, ke nelonge post ĝi la estraro de Germana Esperanto-Asocio anoncis la aplikon de la t.n. arjo-paragrafo, per kiu judaj membroj estus eksigitaj el gvidaj pozicioj, kaj menciis kiel freŝan, koleriganfakton, ke germanaj esperantistoj tradukis en Esperanton kaj dissendis tra la mondo nazian propagandaĵon direktitan kontraŭ judoj. Amare li demandas sin, kiel li, "filo de l' fie humiligata raso", kondutu en la venonta UK, se tie li renkontos "'samideanon' en bruna ĉemizo".[17]

La artikoloj, el kiuj mi citis, aperis plejparte en *Pola Esperantisto*, do ne en internacia Esperanto-gazeto. Lejzerowicz krome publikigis plurajn artikolojn, ĉefe pri internacia politiko, en *Literatura Mondo*. En februaro 1934 Lejzerowicz ricevis plian tribunon, *Nia Gazeto*, periodaĵon, kiu aperis en Nico (Francio) dum kvar jaroj kaj distingiĝis per forta sinligo al la ideo de liberala demokratio. Al ĝia unua numero Lejzerowicz kontribuis per la artikolo "Esperantismo en ekzilo"[18], en kiu li konkludas, ke en movado, kiu allasas la aperon de esperantlingva kontraŭjuda pamfleto, la "ideaj esperantistoj" ne plu povas senti sin hejme. La novan gazeton li prezentas kiel insulon de la Zamenhofa esperantismo, kiel heroldon de vera demokrateco kaj kiel batalanton kontraŭ mallumo kaj malamo. Tiu ĉiam pli decida inklino de Lejzerowicz ne nur defendi la originan "puran idealismon" de la Esperanto-movado, sed rekte ankaŭ nomi aktualajn faktojn, kiuj laŭ li kontraŭas al la Zamenhofa ideo, multe agacis tiujn, kiujn li kalkulis inter la reprezentantoj de la oficiala movado. Plej forte reagis Teo Jung, kiu kompreneble memoris la kontraŭstaron de Lejzerowicz al UK en Kolonjo. Aludante al la artikolo en *Nia Gazeto*, Jung en sia *Heroldo* malakceptis, ke Esperanto estu identigata kun la "interna ideo", precipe se tiu estas senigata de sia karaktero kiel "io nepolitika kaj tre ĝenerala". Jung rekte atakis Lejzerowicz pro lia artikolo kaj, ne indikante lian nomon, nomas lin "la plej 'cinika' incitulo en tuta Esperantujo"[19]. Kiam *Germana Esperantisto* aliĝis al la kritiko de Jung, *Nia Gazeto* malkaŝis, ke en enketo inter la membroj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) el 1048 respondintoj nur 22 esprimiĝis favore al tuja enkonduko de la arjo-paragrafo – ke do signifa parto de la germanaj esperantistoj ne pretis subteni kontraŭjudajn agojn.

En la postaj jaroj la nazia reĝimo stabiliĝis. La signifon de tio por la Esperanto-movado Lejzerowicz en *Literatura Mondo* de novembro 1934 resume bilancis en artikolo titolita "Zamenhof eraris". La Majstro eraris,

17 I. Lejzerowicz, "La mondo atentu!" *Pola Esperantisto* 28. 1934, n-ro 2, pp. 14-16 (cit. p. 15).

18 S. [sic] Lejzerowicz, "Esperantismo en ekzilo", *Nia Gazeto* 1. 1934, n-ro 1, p. 3.

19 T.J., "Sub la masko de la 'interna ideo'", *Heroldo de Esperanto* 15. 1934, n-ro 765, pp. 1-2 (cit. p. 1)

laŭ Lejzerowicz, kredante proksimigi homojn per sia lingvo, anstataŭ unue kongruigi iliajn opiniojn kaj konvinkojn. Nun en "nia 'sankta' lingvo estas eldirataj la plej malnoblaj profanaĵoj kontraŭ homeco". Pri tio kulpas unuavice la mezkvalitaj gvidantoj de la Esperanto-movado. Al ili, laŭ li, "ĉiam mankis la vera intelekteco, necesa por kulturi aŭ disvolvi nian propran ideologion, kiun ĉiu movado nekontesteble nepre bezonas".[20] Poste Lejzerowicz dum iom da tempo silentis, devante kuraci gravan okulmalsanon.[21] Sed en aprilo 1936 li reaŭdigis sin per akra kritiko kontraŭ la oficiala movado, kontraŭ tiuj "gvidantoj kaj misgvidantoj", kiuj degradis la movadon preskaŭ al filatela klubo. Nelonge post la malpermeso de GEA (julio 1936) li kondamnas la provojn obei neŭtralecon en senco ne diferenciganta inter amikoj kaj malamikoj. Post la "entuziasmigado" fare de "falsaj profetoj", la "imputado, ke nenia danĝero minacas nian movadon", kaj precipe la ignoro de la fakto, ke "la hitlerismo estas la plej terura malamiko de la Esperantismo", la movado atingis la nunan situacion: "En la Tria Regno, kiun niaj aŭtoritatoj antaŭ nelonge ankoraŭ kolombe amindumis, hodiaŭ Esperanto estas malpermesita."

Lejzerowicz restas konvinkita, ke Esperanto transvivos la krizon de la movado. Kondiĉo por tio tamen estas, ke la movado senigu sin de la "akvokolora, kripligita, senenhava ideologio brue nomata 'neŭtraleco'". Li postulas, ke la movado racie adaptiĝu al internaciaj sociaj movadoj, "kiuj laŭ sia interna karaktero kaj enhavo staras proksime al la Esperantismo". La malnova, falsa neŭtraleco devos esti anstataŭigita "per tia viviga sociala ideo, kiu ebligos al ni la varbadon de amikoj ĉie, kie la kulturo ne estas jam plene distretita, kie fuzas ankoraŭ komprenemo pri la noblaj celadoj komune-homaj".[22]

Lejzerowicz precizigas tie ĉi la principon de pozitiva neŭtraleco, jam elmetitan tuj antaŭ la Kolonja UK. Estas notinde, ke li faris tion kelkajn jarojn pli frue ol Ivo Lapenna, al kiu ordinare oni atribuas la

20 Georgo Verda [=Izrael Lejzerowicz], "Zamenhof eraris", *Literatura Mondo* IV, 1934, n-ro 9, p. 168. – Por substreki, ĝis kia absurdeco "neŭtraleco" povus iri, Lejzerowicz donas la jenan ekzemplon: "se amerikana, blankhaŭta kompreneble, esperantisto mortigus, pli bone 'linĉus', 'samideanon' negron, vi ne rajtus eldiri proteston kontraŭ tiu barbaraĵo, ĉar la blankhaŭta bandito, kiu feliĉigis la esperanto-movadon per sia aliĝo, subŝovus tiam antaŭ vian nazon la deklaracion pri 'neŭtraleco' […]." (I. Lejzerowicz, "Kvarope ni babilis…", *Nia Gazeto* 1. 1934, n-ro 11/12, p. 3.)

21 Dum tiuj jaroj li okupiĝis pri traduko de la novelo de Stefan Zweig, *Der Amokläufer*. Ĝi estis anoncita por apero en 1935 ĉe la eldonejo Literatura Mondo, sed la eldono ne efektiviĝis. Ankaŭ ne realiĝis la plano de Lejzerowicz kompili antologion de juda literaturo eldonotan de Literatura Mondo.

22 I. Lejzerowicz, "Malfermita vundo", *Nia Gazeto* 3. 1936, n-ro 8/9, pp. 2-3. – Al tiu artikolo poste kontraŭdiris Jan Mędrkiewicz, "Intermiksitaj ideoj", *Nia Gazeto* 3. 1936, n-ro 35, pp. 2-3 ("kondamni 'barbarecon' de Tria Regno, same kiel tiun de Sovetio" ne estas, laŭ la verkinto, la tasko de "Esperanto-aŭtoritatoj", p. 3).

meriton formuli tiun principon. Lejzerowicz ligas ĝin kun la pledo por konsekvenca demokratiigo de la movado. En tiu senco Lejzerowicz estas idea pioniro de la nova, postmilite reorganizita UEA. Oni devas krediti al li, ke, dum la batalemon de Lapenna multe influis lia junaĝa ligo al marksismo, Lejzerowicz estis libera de sindependigo al ideologioj tiutempe modernaj: li fidis nur la konvinkon, kiun li akiris per sia studo de la ideoj de Zamenhof. Dum la 28-a UK en Vieno li ĝoje notis, ke, kiam ĉeĥoslovakiaj germanoj publike deklaris, ke la germanaj esperantistoj restas fidelaj al la Zamenhofa idealismo, "tiam uragano de aplaŭdoj kaj vivukrioj trakuris la salonon".[23]

Proksimiĝis la 29-a UK, kiu estis okazonta en Varsovio en 1937, kvindek jarojn post la estiĝo de Esperanto. Tiu kongreso "elektrizis" Lejzerowicz, ĉar li atendis, ke ĝi krom esti okazo por feste jubilei inspiros al la Esperanto-movado novan memfidon kaj kuraĝon. La esperoj nur parte plenumiĝis. La riĉa kongresa programo, kiu inkluzivis ekskurson al Bjalistoko (la "Esperanto-Betlehemo", kiel foje Lejzerowicz ĝin nomis[24]), kontentigis la plimulton de la mil partoprenantoj. Sed la skismo en la internacia movado ne povis esti riparita; paralele ekzistis du mond-organizaĵoj, Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Ligo. Pli malbone, malfavoraj eksteraj cirkonstancoj ĵetis ombron super la Jubilean Kongreson. Jam antaŭ ĝi parto de la gazetaro atakis la polan registaron pro tio, ke ĝi konsentis pri la okazigo de "jud-komunista" kongreso. Dum la kongresa semajno mem tiuj gazetoj, ekstreme dekstraj aŭ faŝismaj, presis absurdajn kalumniojn pri la Esperanto-movado. Kiel Lejzerowicz priskribis en artikolo aperinta en *Literatura Mondo*[25], ili per "cinike senhontaj atakoj" kreis tiel preman atmosferon, "ke la kongresanaro, almenaŭ granda ĝia parto sentis sin kvazaŭ terorita". Li ankaŭ amare raportis, ke projekton de rezolucio, kiu vokas al batalo kontraŭ rasa malamo, dum la Kongreso sukcese faligis la timemaj "neŭtraluloj".

Du jarojn poste eksplodis la Dua Mondmilito, kies unua viktimo estis Pollando. Nelonge antaŭ ol Lodzo estis okupita de germanaj trupoj, Lejzerowicz fuĝis el sia hejmurbo. Lia celo estis Varsovio. Sed survoje li estis kaptita kaj metita en koncentrejon apud Krakovo. Post kelkaj monatoj li liberiĝis kaj fine tamen atingis Varsovion.

Komenciĝis por Lejzerowicz same kiel por centmiloj da judoj la vivo, terura vivo, en Varsovio, en la Varsovia geto. Pri la suferoj de tiuj judoj, pri la malsato, persekutado kaj ekstermado ni havas multe da

23 Georgo Verda, "Wien 1936", *Literatura Mondo* II, 6. 1936, n-ro 5, pp. 117-124 (cit. p. 121).

24 I. Lejzerowicz, "Profeto en sia urbeto", *Pola Esperantisto* 23. 1929, n-ro 12, pp. 160-161 (cit. p. 161).

25 Georgo Verda, "La Jubilea", *Literatura Mondo* II, 7. 1937, n-ro 4, pp. 97-100.

raportoj kaj atestoj, kaj tial eĉ sen la ekzisto de materialo rekte rilatanta al Lejzerowicz ni povas imagi, en kiuj suferigaj kondiĉoj li kaj lia familio troviĝis. Ni tamen scias, ke li klopodis zorgi pri Esperanto eĉ en la geta teruro. Isaj Dratwer (1905-1985), unu el la malmultaj judaj esperantistoj en Pollando, kiuj transvivis la nazian okupadon, post la milito raportis, ke en la geto okazis konspira Zamenhof-festeto kaj ke la parolado, kiun tie faris Izrael Lejzerowicz, "kiel kutime, estis impresa, profundsenta, malgraŭ ĉio li kredis la triumfon de Homo, ke venkos la historia justeco".[26] Dratwer ankaŭ sciigis, ke Lejzerowicz en la geto komencis traduki en Esperanton la versan eposon *Konrad Wallenrod* de Adam Mickiewicz[27] kaj ke jidlingve li verkis romanon kun supozeble aŭtobiografiaj trajtoj.

Nenio postrestis el tiu literatura aktivado de Lejzerowicz en la Varsovia geto. Sed ja konserviĝis skribaĵoj, kiuj estas liaj lastaj vivsignoj. Antaŭ pluraj jaroj mi foje grimpis al la subtegmentejo de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, kiun kutime eĉ la oficistoj ne eniris. Interesis min tie arkivaĵoj el la Ĝeneva tempo de UEA. Mi foliumis jen en tiu, jen en alia polvokovrita dokumentujo. Tiam altiris mian atenton dosiero pri la helpagado de UEA dum la Dua Mondmilito. Oni scias, ke Hans Jakob (1891-1967), la direktoro de UEA en Ĝenevo, provis kaj iom sukcesis fruktuzi la pozicion de neŭtrala Svislando por helpi esperantistojn en la nazie okupitaj landoj. Kadre de tiu "Esperantista Interhelpo" li ekzemple sendis pakaĵojn al la familianoj Zamenhof vivantaj en la Varsovia geto.

En tiu dosiero mi trovis ses poŝtkartojn de Izrael Lejzerowicz. Ili estas skribitaj en la jaro 1941 kaj adresitaj al Hans Jakob en Ĝenevo. Ili portas la adreson "Warschau, Wielka 19/9" kaj estas ĉiuj verkitaj, pro la cenzuro, en la germana lingvo. (Sian nomon li tie skribas "Lajzerowicz".) La unua poŝtkarto estas de la 12-a de marto 1941. En ĝi Lejzerowicz asertas, ke li kaj lia familio estas sanaj, demandas pri la farto de samideanoj Braga, Querin kaj Parrish[28] kaj aparte interesiĝas pri Akiwa Gerszater, gvida juda esperantisto en Vilno.[29]

Lejzerowicz tre ĝentile petas, ke Jakob "transdonu al kelkaj amikoj

26 Isaj Dratwer, "Izrael Lejzerowicz. Georgo Verda", *Literatura Mondo* III, 1. 1947, n-ro 5/6, p. 86.

27 Sed fragmento aperis jam en *Junula Voĉo*, 1921, n-ro 1.

28 Temas verŝajne pri la brazilano Ismail Gomes Braga (1891-1969), la argentinano Salvador Querín kaj la usonano Donald E. Parrish (1889-1969).

29 Kion Lejzerowicz neniam povis ekscii: Akiwa Gerszater travivis en Vilno unue la sovetian okupacion de Litovio, poste la alvenon de germanaj trupoj. Fine de 1943 lin minacis transporto en geton kaj baldaŭa mortigo, sed la litova esperantisto Antanas Poška (1903-1992) dum preskaŭ dek monatoj kaŝis kaj nutris lin en sia hejmo. Gerszater mortis en Israelo en 1964.

mian peton bonvole sendi al mi, se eble, pakaĵojn". Jakob – en sia satiro *Verda Biblio* Lejzerowicz milde mokas pri la "patriarko Jakob", kiu "vekas en la verda popolo piecon kaj oferemon" – tuj respondis (24-3-1941), kaj Lejzerowicz sciigas al li en nova poŝtkarto, la 16-an de aprilo, ke "la fakto, ke vi volas por mi laŭeble ion fari, simple feliĉigis min", kvankam la anoncita pakaĵo ankoraŭ ne alvenis. Kvazaŭ flanke Lejzerowicz petas al Jakob: "Eble vi povos klopodi pri la ŝanco de elmigro al Sudameriko, eventuale Nordameriko, Kubo ktp."[30]

Du monatojn poste, laŭ la tria poŝtkarto de Lejzerowicz, de la 21-a de junio, la pakaĵo plue ne alvenis. Li dankas pro letero de Jakob de la 22-a de majo kaj raportas, ke lia edzino estis dufoje operaciita, sed nun fartas pli bone. Eksciinte pri la morto de Vilmos Bleier (1903-1940), la eldoninto de *Literatura Mondo*, Lejzerowicz demandas al Jakob, kiel fartas Baghy kaj Kalocsay, al kiu lasta li skribis antaŭ unu jaro, "sed ne ricevis respondon". Li petas krome: "Kara Jakob, ne forgesu ankaŭ pri Lidia [Zamenhof]. Faru por ŝi ĉion, kio eblas."[31]

De tiam poŝtaĵoj de Jakob ne plu atingis Lejzerowicz. La 5-an de aŭgusto li precizigas, ke li bezonas precipe pakaĵojn kun vestaĵoj ("malnovaj, sed porteblaj"). La 18-an de septembro li danke konfirmas la ricevon de "kelkaj pakaĵetoj" senditaj de la ĉefdelelegito de UEA en Portugalio Manuel de Freitas (1910-1996) laŭ perado de Jakob.

La lasta konservita poŝtkarto estas de la 19-a de novembro 1941. Ĝi estas kun peno kaŝita helpokrio. Lejzerowicz informas, ke li havas parencojn en Usono, Brazilo kaj Parizo, sed perdis iliajn adresojn. Li petas, ke Jakob helpe de tiuj parencoj kaj de amikoj sendigu al li pliajn pakaĵojn.[32] Kaj li ripetas ankaŭ sian peton pensi pri Lidia, kiu "estas nun tute sola kun sia fratino [Zofia]". Li sciigas, ke ŝia onklino Helena forpasis.[33]

Tiutempe komenciĝis la sistema mortigado de judoj. La plej multaj historiistoj supozas, ke plej malfrue meze de decembro 1941, do proksimume unu monaton post tiu lasta vivsigno de Lejzerowicz, Hitler definitive komprenigis al siaj subuloj, ke ĉiuj judoj estu mortigitaj. La deportado de judoj el la Varsovia geto al la neniigejo Treblinka komenciĝis la 23-an de julio 1942. Provizore povis saviĝi tiuj, kiujn

30 En la sama poŝtkarto Lejzerowicz raportas, ke "fraŭlino Br. [=Bronisława] Aronowicz", kiun ŝajne Jakob bone konis, pro malsano mortis komence de aprilo.

31 La 25-an de junio 1941 Lidia dankis al Jakob pro la ricevo de du pakaĵetoj "el Porto", t.e. de Manuel de Freitas: *Esperanto* 37. 1941, n-ro 489, p. 22.

32 Lejzerowicz aludas, ke por la pakaĵoj Jakob David Applebaum (1877-1964), poldevena judo vivanta en Anglio, pretas pagi al Manuel de Freitas. Tiun ankaŭ polaj judoj en Lisbono monsubtenis: *Esperanto* 37. 1941, n-ro 490, p. 2.

33 Helena Zamenhof (1874-1940), la vidvino de Felikso, mortis en la Varsovia Geto pro tifo.

bezonis germanaj laborejoj. Al ili apartenis kredeble ankaŭ Lejzerowicz. Kiam Dratwer laste renkontis lin surstrate en julio/aŭgusto 1942, li aŭdis de li, ke li aliĝis kiel laboristo al iu germana entrepreno.[34] Verŝajne nelonge poste la familio Lejzerowicz estis deportita kaj gase murdita. Eble tio okazis komence de septembro, kiam Lidia Zamenhof estis sendita en la mortigejon. Pri la fina sorto de Lejzerowicz Dratwer eksciis, ke la nazioj "trenis lian filineton, edzinon [Regina] kaj lin, ĉiun aparte, en vagonarojn" direktitajn al Treblinka.

* * *

Kiel ni plej trafe karakterizu la homon kaj esperantiston Lejzerowicz? Mi volas nomi lin "radikala esperantisto". En *Plena Ilustrita Vortaro* oni trovas la jenan klarigon de "radikala": "Iranta gis la radikoj, atinganta la fundamenton, trafanta la bazajn principojn". Ĝuste tio plej bone karakterizas Lejzerowicz. Li ĉiam sentis sin unuavice ligita kun la radikoj de Esperanto, kun la idealoj de Zamenhof. La forto de lia konvinko donas al ni imagon pri tio, kiom efikis tiuj idealoj inter la samtempuloj de Zamenhof, la pioniroj, kaj kian grandan rolon ludis inter ili judoj kiel Lejzerowicz.

La Bulonja Deklaracio de 1905 celis iom bridi la pionir-epokan idealismon por malfermi al Esperanto pli vastan uzeblon. Kontraŭdiroj de tiam regis en la movado, inter la esperantistoj. Iuj akcentis la praktikan utilon, aliaj nepre emfazis la originan idealon, denove aliaj volonte parolis pri la interna ideo, sed samtempe, nome de la principo de neŭtraleco, timis konkretigi ĝin. La kontraŭdirojn la movado iel-tiel sukcesis elteni – tiel longe, kiel oni povis esperi pri principe favoraj eksteraj kondicoj, pri progreso sur la vojo al paco, demokratio kaj egalrajteco.

La esperojn pri laŭgrada progreso detruis la nazioj. Ili senkaŝe deklaris batalon al t.n. "judaj popolinterfratigaj iluzioj". Tio estis militdeklaro al la homaro kaj ĝiaj fundamentaj valoroj. La alproksimiĝantan danĝeron multaj esperantistoj, iom naivaj, iom oportunistaj, ne vidis. Estus nejuste kulpigi ilin nun – multegaj homoj ekster la Esperanto-movado kondutis simile, ignorante la nazian minacon al la homaro. Estas konforme al la naturo de la homo ne povi imagi al kiuj kulminoj kaj abismoj de teruro iros la nazia reĝimo.

Tial des pli granda estas la signifo de Lejzerowicz. Inter la esperantistoj neniu tiel frue, tiel klare kaj tiel senkompromise protestis kontraŭ la monstra ideologio kaj krimaj faroj de la nazioj, neniu tiom aver-

34 Dratwer, 1947, p. 86.

tis, alarmis kaj vokis al batalo kontraŭ ili en la nomo de defendo de la Zamenhofaj idealoj. Lejzerowicz – li mem kalkulis sin inter la "nerebonigeblaj" Zamenhofanoj[35] – bazis sian argumentadon ne sur teorioj de antifaŝismo, de klasbatalo aŭ cionismo, sed sur la pura deziro defendi simple la bazajn homajn valorojn. Estis la krio de homo, kiu vidis sin vundita en la fundo de sia koro, ĉe sia radiko. Kaj irante al la radikoj, li trafis la bazajn principojn de la Esperanto-movado. Pro tio mi nomas lin "radikala esperantisto".

Lejzerowicz ĉiam kredis je venko de homeco. Ni ne scias, ĉu ĝisfine li konservis tiun fidon. La fantazio ne sufiĉas por konsciigi al ni, kiel li eble pensis en la lastaj tagoj, horoj, minutoj de sia vivo. Sed tiel longe, kiel vivas Esperanto, lia idealo, ne mankos al ni vortoj por esprimi en tiu lingvo, en nia lingvo, niajn sentojn de respekto kaj admiro al Izrael Lejzerowicz.

*Tio ĉi estas pliampleksigita versio de prelego farita en 2000 kadre de la Internacia Kongresa Universitato en Tel-Avivo.*

---

35 I. Lejzerowicz, "Kvarope ni babilis…", *Nia Gazeto* I. 1934, n-ro 11/12, p. 3.





***En la mondon venis nova lingvo. Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins***

Red. Gotoo Hitosi, José Antonio Vergara, Kimura Goro Christoph.

Tole bindita, kromkovrilo.
708 p., ISBN 9781595693785.

Per ĉi tiu volumo la aŭtoroj de la kontribuaĵoj kaj la redaktoroj deziras esprimi sian dankon al la jubileulo pro lia vivoverko, i.a. pro liaj kontribuoj al la historiografio de Esperanto kaj la klopodoj sur la kampo de rilatoj inter oriento kaj okcidento de la movado.

**MENDU ĈE UEA, landaj libroservoj, retaj vendejoj aŭ vizitu www.librejo.com**

Reklamo (vidu la recenzon sur p. 145.)